



INFORMILO

7-8

Julio-aŭgusto 2026 Kol. 491/42

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

Enhavo: Proverboj julio kaj aŭgusto, Kongreso en Olomouc, La 113-a UK en Litovio, Kunveno de la praga E-klubo, Roboto, Kastelo Maleč, Turmentado per bruoj, Artefarita inteligenteco.

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

Popolaj proverboj (prognozoj) julio

Kiam la tago longiĝas, la varmo pliiĝas.

Se la suno julie forte brilas - la fulmotondro baldaŭ veni devas.



Dum julio la kortoj dezertmalplenas,
sed la kampoj homdensas.

Se la formikejo en julio estas ĉie, forta
vintro estos.

Sankta Margareta (13. 7.) festas - la
serpon ŝi en la sekalon ĵetas.

(komenciĝas rikolto)

Sankta Anna (26. 7.) venigas
malvarmajn matenojn.

Popolaj proverboj (prognozoj) aŭgusto

Aŭgusto al aŭtuno proksimiĝas, la birdoj al forflugo prepariĝas.

Se la suno dum aŭgusto forte brilas, sekve dolĉa vino sur la
lango gustos.

La varmega aŭgusto hejmen nin allogas, la malvarma septembro el la arbaron nin pelas.

Aŭgusto metas grenon en spikojn kaj fruktojn en ĝardenojn.

Ekde la tago de Sankta Bartolomeo (24. 8.), la suno ŝparas sian sunradiojn.

Se multe dum aŭgusto fulmotondras, venonta vintro estos tre malvarma.



Komuna ĉeĥa kaj germana Esperanta kongreso en Olomouc

De la 22-a ĝis la 25-a de majo 2026 ni partoprenis la kongreson kun jena programo:

Vendrede - post aliĝo ni disiris loĝiĝi. Vespere ni ĉiuj renkontiĝis en la restoracio Fontána en la Parko de Smetana, kie ankaŭ estis vespermanĝo kaj poste prelegoj.

Anton Oberndorfer prelegis pri la temo „Poemoj en lingvolernado“ kaj Jiří Tomeček informis nin pri la urbo Olomouc.

Sabate – jarkunsido de GEA kaj jarĉefkunveno de AGEI okazis. Post tagmanĝo ni promenis tra la urbo Olomouc, vizitis la Esperanto-memorŝtonon kaj diversajn lokojn en la urbocentro. Ni vizitis ankaŭ ekspozicion pri karnovoraj plantoj en la forcejoj de Flora Olomouc. Post vespermanĝo estis prelego de Lu Wunsch-Rolshoven „Misinformoj pri Esperanto“. Post la prelego sekvis vingustumado.

Dimanĉe okazis tuttaga ekskurso al la urboj Svitavy kaj Česká Třebová. En la urbo Svitavy ni vizitis Esperanto-muzeon kaj promenis tra la urbo. Post tagmanĝo ni veturis en la urbon Česká Třebová, kie ni vizitis muzeon kun Esperanto-kolekto, bazaron kaj koncerton sur la centra placo. Post vespermanĝo, jam denove en la restoracio Fontána, prelegis Petr Chrdle pri mondaj heredaĵoj sur la teritorio de Ĉeĥio kaj Vladimír Türk pri historio de trampa movado en Ĉeĥio.

Lunde ni ĉiuj hejmenveturis.

Eva Pazourková

La 113-a UK en 2028 okazos en Kaŭno, Litovio!

La estraro de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kun ĝojo anoncas, ke la 113-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en la jaro 2028 okazos en Kaŭno (Kaunas), Litovio.

Post Melburno/Narrm en 2027 la UK revenos en Eŭropon – kaj same, post la 90-a UK en Vilno, revenos en Litovion kaj al Baltio. Okazonte la unuan fojon en Kaŭno, la 113-a UK gastos en la dua plej granda urbo de Litovio. Ĝi estas unu el la plej gravaj kulturaj centroj de Baltio situanta ĉe la kunfluejo de la riveroj Nemunas kaj Neris. Kaŭno havas riĉan historian heredaĵon kaj viglan nuntempan urban vivon. Dum la intermilita periodo Kaŭno funkciis kiel provizora ĉefurbo de Litovio kaj evoluis al grava centro de kulturo, klerigado kaj moderna arkitekturo. Ĝia modernisma arkitekturo ricevis rekonon de Unesko kiel Monda Heredaĵo.

Kaŭno aldone havas historian kaj simbolan signifon por nia movado: la urbo estas forte ligita al la historio de Esperanto. En Kaŭno naskiĝis unu el la plej gravaj subtenantoj de la frua

Esperanto-movado, Klara Zilbernik, la edzino de L. L. Zamenhof, sen kies malavara gesto kaj amo ne estus eldonita la Unua Libro. Tiu historia ligo donas al la kongreso apartan simbolan dimension kaj eblon omaĝi gravan virinon de la Esperanto-historio.

Litova Esperanto-movado havas longan kaj respektindan tradicion. Litova Esperanto-Asocio (LEA) dum jardekoj aktive kontribuas al internacia Esperanto-agado, organizado de eventoj kaj kultura kunlaboro. Pro tio UEA kun entuziasmo akceptis la inviton de LEA kongresi en Kaŭno en 2028.

Kaŭno ofertas taŭgan kaj modernan infrastrukturon por internacia evento: universitatojn, kongresejojn, viglan kulturan vivon, piedireblan urban centron kaj ampleksajn turismajn eblojn. Vizitantoj povos ĝui historiajn urbokvartalojn, muzeojn, koncertojn, verdajn parkojn kaj la apartan etoson de moderna balta urbo.

Ĉu ankaŭ vi partoprenos tiun ĉi kongreson? Pli detalaj informoj pri la datoj, kongresejoj kaj aliĝado aperos poste pere de la komunikiloj de UEA kaj la retejo de UK. Specialan kaj ekskluzivan rabaton je la aliĝo ricevos partoprenontoj, kiuj aliĝos dum la 112-a UK okazonta en Melburno/Narrm en 2027. Tia sama rabato disponeblos por kongresanoj, kiuj deziras aliĝi al 112-a UK dum la baldaŭ okazonta de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2026, 111-a UK en Graco, kie ankaŭ la 113-a UK reklamiĝos. UEA kore dankas al LEA kaj al ĉiuj lokaj organizantoj kaj partneroj, kiuj jam vikle laboras por prepari sukcesan kaj memorindan UK-on en Kaŭno.

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

Kunveno de la praga E-klubo en ateliero

Jaŭde la 21-an de majo, la klubanoĵ, anstataŭ en sia klubejo, kunvenis en la ateliero de pentristino, praga klubanino, Běla Sýkorová.



Ĉiuj klubanoĵ sukcese trovis la atelieron, nur unu anino travagis „la tutan kvartalon “ Strašnice“, serĉante la ĝustan domon.

Sed ankaŭ ŝi finfine ĝisvojaĝis.

Sinjorino Běla akceptis ĉiujn 11 homojn tre afable.

En ŝia tre bela, sunplena ateliero, samtempe loĝejo, ŝi prezentis siajn pentro-verkojn, rakontis pri sia arta agado, pri planoj por la estonteco.


La kunveno ekster la klubejo estis vere sukcesa. Koran dankon al vi, Běla! Fartu bone, estu sana kaj sukcesa!

L. Chaloupková

Ĉeĥo inventis ĝin.

La vorto „roboto“ estas konata tra la tuta mondo. Ĉiuj lingvoj transprenis ĝin. Inventis ĝin du ĉeĥaj fratoj. Unu proponis ĝin, la alia donis ĝin al la mondo.

Estis la jaro 1920. Karel Čapek por la Nacia Teatro verkis teatraĵon pri artefaritaj laboristoj. Li ne sciis, kiel nomi ilin. Li



pripensis la vorton „laboro“, de la latina vorto por laboro. La termino ŝajnis al li tro papereca.

Li iris al sia frato Josef, pentristo, kiu staris ĉe la tolo. Sen levi la okulojn de sia laboro, Josef diris la solan vorton „roboto“.

De la malnova

slava vorto „robota“, signifanta servutan laboron. Kaj li daŭrigis sian pentradon.

La teatraĵo „R.U.R.“ havis sian mondpremieron en januaro 1921 kaj ene de nur du jaroj ĝi estis tradukita en tridek lingvojn. Neniu el ili havis propran terminon por artefaritaj estaĵoj, kiuj laboras anstataŭ homoj. Ili ĉiuj adoptis la vorton „roboto“ sen traduko. Tiel tio estas ĝis hodiaŭ. „Roboto“ estas unu el la malmultaj ĉeĥaj vortoj, kiujn la tuta mondo konas. Kaj preskaŭ neniu scias, ke ĝi estas ĉeĥa.

Skribis kaj pentris Běla Sýkorová

Nerimarkita kastelo plena de muziko kaj historio

Václav Macháček-Rieger estas posteulo de la revivigantoj



František Ladislav
Rieger kaj
František Palacký.

Li iam haltigis sian
sukcesan muzikan
karieron por prizorgi
restituitajn
posedaĵojn. Li
renovigis la kastelon
en Vysočina

(Altlando) kaj establis tie ekspozicion pri siaj famaj prapatroj.

Proksime al la Železné hory (Fera Montaro) oni povas trovi neokulfrapan **vilaĝon Maleč**. Dominas ĝin malgranda kastelo kun angla parko. La kastelo altiras atenton de vizitantoj per sia bunta historio, kiu estis ĉi tie laŭvorte skribita. La historio de la kastelo estas ligita kun muziko. Muziko akompanas vizitantojn dum la vizito de la kastelo kaj oni povas aŭdi ĝin ankaŭ en la ĝardeno.

La antaŭa posedanto, nacia reviviganto kaj politiko, barono František Ladislav Rieger, verkis poemojn, el kiuj kelkaj, post ilia muzikigo, fariĝis popularaj kantoj. Lia bopatro František Palacký, kiu ĉi tie verkis sian verkon „Historio de la Ĉeĥa Nacio“, estis orgenisto, harpisto kaj brila pianisto. Li ankaŭ studis muzikteorion kaj komponadon.

La administranto de la kastelo iam estis Václav Červinka, kiu komponis la akompanan muzikon por la teatraĵo „Niaj Fanfaronuloj“ (Naši furianti) de Ladislav Stroupežnický, prezentita en la praga Nacia Teatro. Ankaŭ Antonín Dvořák estis ofta gasto ĉi tie; la filino de Rieger, Marie, verkis la tekstlibretojn por du liaj operoj.

Ankaŭ Václav Macháček-Rieger, la nuna posedanto de la kastelo, estis sukcesa muzikisto. Li 20 jarojn agis kiel basgitaristo por la bando Country Beat de Jiří Brabec. Kun la bando, kiun li fondis kune kun Brabec kaj Jiří Grossmann, ili plurfoje sukcese partoprenis la festivalojn en Wembley kaj Nashville. La bando ludis gravan rolon en la repertuaro de la Teatro „Semafor“, kie ili agis dum siaj komencaj tagoj, ofte ludante tridek fojojn monate. La iama muzikisto ankoraŭ kun dankemo memoras varman bonvenigon de Jiří Suchý, kiu ankaŭ vojaĝis kun ili al diversaj muzikaj eventoj.


La velura revolucio ŝanĝis multon por Macháček-Rieger. Lia patrino, konata germanistino Věra Macháčková-Riegerová, petis en la restituo la konfiskitan familian posedaĵon. Václav helpis al ŝi dum la restitua proceduro kaj pli tarde heredis la posedaĵon.

Skribis kaj pentris Běla Sýkorová

Turmentado per bruo

Ni vivas en mondo, kiu fariĝas pli kaj pli laŭta. Sed troa bruo povas kaŭzi kaj fizikajn kaj mensajn problemojn.

Martelado sur la muron, borado, ŝlifado, zumado de polvosuĉilo, bojado kaj hurlado de hundoj, kiujn iliaj posedantoj dum la tago lasis hejme solaj. Tage kaj nokte senĉesa bruo de tramoj, aŭtoj aŭ aviadiloj en grandaj urboj, zumegado de gazontondiloj, pumpiloj, ĉensegiloj kaj ŝlifmaŝinoj en la vilaĝoj... La moderna mondo donacas al ni malpli kaj malpli da silento kaj trankvilo. Multaj homoj ignoras tion kaj metas aŭdilojn en siajn orelojn, sed aŭskultante tro laŭtan muzikon ĉiuokaze ili neintencite difektas siajn aŭdsenson kaj nervojn.



Dum longa tempo, bruosentemon kuracistoj malgravigadis. Nur lastatempe sciencistoj malkovris, ke ĝi povas havi longdaŭrajn efikojn sur mensan kaj fizikan sanojn. “Kaze de mallongdaŭra ekspoziciado, ĝi povas, ekzemple, konduki al memoro- kaj atento-

malsanoj, sed ĝi povas konduki ankaŭ al laciĝo, depresioj aŭ agresemo. Longdaŭra ekspoziciado al bruo aldone pligrandigas la riskon de imunsistema perturbo, kiu povas manifestiĝi per pli malalta rezisto kontraŭ infektoj, pliigita incidenco de inflam-malsanoj, koraj kaj vaskulaj malsanoj, damaĝigo de la kardiovaskula sistemo, kaj iuj malsanoj de la digesta sistemo.

„Estis pruvita ankaŭ pli granda risko de diabeto,” konfirmas neŭrosciencistino Elvira Brattico el la Universitato de Aarhus en Danio. „Kelkaj studoj montras, ke ekspoziciado de gravedaj virinoj

al bruo povis influi la evoluon de la feto en la utero, la pason kaj rezulton de la gravedo, ekzemple en la formo de malalta naskopezo de la novnaskito,” ŝi aldonas.

Ĝenerale estas konate, ke eĉ mallongdaŭra eksponiĝo al troa bruo povas neinvertigeble damaĝigi la aŭdsistemon kaj, sekve, konduki al aŭdperdo aŭ surdeco. Aŭskultado de tro laŭta muziko per aŭdiloj aŭ dum rokmuzika koncerto pli kaj pli kaŭzas ĉe junuloj tiel nomatan akustikan traŭmaton, kiu konsistas en difekto de la timpano, aŭdaj ostetoj aŭ la membraneca labirinto en la orelo. „Longtempa eksponiĝo al bruo dum pluraj jaroj, ekzemple en la laborejo aŭ en loĝejo proksime de trafikplena vojo aŭ fervojlinio, pliigas la riskon de difekto al la ĉeloj de la interna orelo,” avertas Daniel Shepherd. La manifestiĝo de tia difekto povas komence esti portempa malboniĝo de aŭdado. Sekve, la kapablo kompreni homan paroladon iom post iom konstante malboniĝas, kaj minacas risko de tinito, kiu manifestiĝas per neeltenebla fajfado, sonorado, zumado, muĝado, siblado aŭ tiktakado en la oreloj.

Ripetata kaj longtempa eksponiĝo al bruo povas en la homa korpo kaŭzi konstante plialtigitan sangopremon, do hipertension, kaj iskemian kormalsanon, t.e. nesufiĉan oksigenprovizadon de la kormuskolo. Rezulte de ĉi tiuj ŝanĝoj, ankaŭ pligrandiĝas la risko de koratako.

Ĉe homoj kun depresiaj tendencoj, ĝi povas konduki al gravaj psikaj perturboj, kiujn ili pli facile povus alfronti en trankvilo kaj silento.

Granda elcento de homoj forpelas noktan streson kaj dormoperturbojn per noktaj atakoj al la fridujo, kiu kondukas al pligrandigoj de pezo kaj obezeco. „Troa pezo estas en Eŭropo kaj Usono la kaŭzo de ĝis 15 elcentoj de mortoj, kaj granda parto de infanoj jam suferas pro obezeco,” memorigas Elvira Bratiico. Ŝi referencas al lastatempa raporto de la Eŭropa Media Agentejo, kiu deklaras, ke troa ĉirkaŭa bruoj estas ĉiujare la kaŭzo de antaŭtempa morto de pli ol 16 000 eŭropanoj. Ĉirkaŭ 13 milionoj da homoj sur nia kontinento suferas dormperturbojn pro bruoj, kaj pliaj 30 milionoj estas ĝenataj de ĝi. El la revuo „Květy“ elektis Eva Pazourková, esperantigis Fejfi

Artefarita inteligenteco (AI) povas ŝanĝi la estontecon de universitata klerigado.

AI estas komuna partnero por studentoj kaj instruistoj en ĉiuj disciplinoj. Por la nuntempaj studentoj ĝi estas grava ne nur kiel ilo por faciligi iliajn studojn sed ankaŭ kiel baza laborkapablo. Ĝi alportas al ili multajn avantaĝojn. Ekzemple, ĝi permesas al ili krei individuajn studplanojn kaj adaptajn materialojn por kongrui kun ilia progreso. Signifa avantaĝo de uzado de AI estas ankaŭ la aŭtomatigo de administraj procezoj. Tamen, ĝi postulas, ke studentoj majstru novajn kapablojn. La kapablo efike uzi AI-n kaj kontroli ĝiajn rezultojn fariĝas ŝlosila aspekto de ĝia kunlaboro. La rolo de la instruisto ŝanĝiĝas de simpla transdono de informoj; la emfazo estas metita sur disvolviĝon de kritika pensado. Rilate al disertaĵoj, necesas redifini la regulojn por citi la uzon de AI. Multaj fakuloj konsentas, ke ju pli frue studentoj lernos labori kun ĉi tiuj iloj, des pli grandan avantaĝon ili akiros en siaj estontaj profesiaj karieroj.

Klerigaj institucioj devos trovi manierojn, kiel plej bone prepari studentojn por postvivi en labormerkato trafita de aŭtomatigo. La ebleco krei individuajn studplanojn, t.e., forigo de la iam ofte praktikata aliro „unu-grandeco-taŭgas-por-ĉiuj“, estas ĝuste tio, kio reprezentas signifan progreson. Ekzistas sistemoj kapablaj observi la individuan progreson de unuopaj studentoj kaj poste "tajlori" iliajn studplanojn. Ili povas identigi areojn, en kiuj studento postrestas laŭlonge de la tempo, kaj oferti al ili adekvatan subtenon. Tamen, AI en klerigado havas ankaŭ siajn negativajn flankojn.

Tria-nivelaj klerigaj instancoj devos restrukturi sistemojn por protekti kontraŭ plagiato; tiuj uzitaj ĝis nun ne plu plenumas nunajn bezonojn. Estas aparte necese, ke studentoj sciuj precize, kiam AI-helpo estas akceptebla kaj kiam ne.

Artikolo el interreto, mallongigita kaj tradukita de Běla Sýkorová

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**

Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,

530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: ah@esperanto-ah.eu interreto: www.esperanto-ah.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky 2010

IBAN: CZ3520100000002801322017 **SWIFT/BIC:** FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **22 €** (en kovertoj), aŭ **11 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **400,-Kč** (v obálkách), nebo **200,-Kč** (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše **příjmení** jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.